



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,  
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ la mondo).

Numero 158

Junio, 1999

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto

Stevens Norvell — kompostisto

Geoffrey Greatrex — preskontrolisto

Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson

329 Poplar Drive

Dartmouth, Nova Scotia

KANADO B2W 4K8

bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:

Reni Porter

71 RidgeValley Road

Halifax, Nova Scotia

KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

## SEKRETA LINGVO

Ĉu vi iam ajn revis pri sekreta lingvo? Antaŭe mi tion faris, sed ne plu. Tio komenciĝis antaŭ kvar jaroj kiam mi studis en la tria klaso. Tiam F-ino Dorothy (Kim) Keeble venis al la lernejo por instrui Esperanton al ni.

Unue ŝi instruis al nia klaso, kaj poste iniciatis tagmezan klubon por ĉiuj kiuj interesiĝis pri Esperanto. El 31 geknaboj, sep knabinoj aniĝis al la klubo.

Dum la klas-instruado ni lernis ke Esperanto estas simpla internacia lingvo kiu havas nur 16 regulojn kaj neniun escepton. Esperanto ja estas ne tute senŝerca afero. Ankaŭ estas amuza, ekzemple la unuan fojon kiam Kim demandis al ni “Kiel vi fartas?” Ĉiuj el ni ekridegis ĉar ni opiniis, ke ŝi parolis pri furzo (la angla vorto “fart” signifas “furzi”) anstataŭ demando pri nia sanstato.

Dum la klub-kunvenoj ni kantis kantojn, ludis ludojn, korespondis kaj faris notojn (ni ankoraŭ faras tion) “tute en Esperanto”. Ni elektis la kluban nomon “La friponetoj”. Ni ankaŭ elektis bestonomojn por ni mem. La mia estis kaj ankoraŭ estas “Blankapa Aglo”, sed aliaj ŝanĝis la siajn.

La sekvantan jaron, en la kvara klaso, Kim ne rajtis instrui dum la kutimaj lernejo-horoj, sed ankoraŭ daŭrigis la klubon. Ŝi ŝanĝis la tempon por instruado ĝis post la lernejo-horoj, por ke ni povu lerni dum tuta horo semajne anstataŭ nur duonhoro je tagmezo.

daŭrigata ⇒

daŭras ⇒

Tra la jaroj inter la tria kaj sesa klasoj, du aliaj aniĝis al la klubo sed ili ambaŭ forlasis ĝin. Do, nun ni estas nur kvin knabinoj — Patricia, Kristyn, Krista, Amelia kaj mi” — anstataŭ sep. Unufojon knabo penis aliĝi (li estis Brian, la filo de kuzo de mia patro) sed trovis ke li ne simpatiis al tia klubo, kaj li baldaŭ forlasis ĝin.



Kim estis pli ol instruistino por ni. Ŝi estis amikino, imitinda modelo kaj fidindulo.

Nu, tio estas la rakonto pri la Friponetoj. Antaŭ kvar jaroj tio komenciĝis kaj, post kelkaj monatoj ĝi povus ĉesi tiel silente kiel ĝi komenciĝis — sed ne se ni havos voĉon en la afero!

— Iona Corbin (11-jara), Tradukis el la angla Kim Keeble

## INTERNACIA RETO DE ESPERANTISTAJ HISTORIISTOJ

Montrealo, Kebekio, la 4-an de marto 1999

Mi estas historiisto kaj esploristo. Mi verkis kelkajn artikolojn pri la esperantista movado de Kebekio kaj pri homaranismo. Mi konstatis ke estis malfacila serĉi dokumentojn kaj informojn pri nia movado, ĉefe en Nordameriko ĉar ni havas nek centralizitajn arkivojn nek reton de esploristoj. Mi estas konvinkita ke multaj esperantistaj historiistoj alfrontis tutmonde tiun ĉi problemon.

Do, mi proponas al ĉiuj esperantistaj historiistoj (amatoraj kaj profesiaj) fondi fakan societon aŭ reton kiun ni povus eble nomi Internacia Societo de Historio aŭ iun ajn taŭgan nomon. Krome, utilas tiu reto por publikigi, eble en elektronika revuo aŭ per aliaj rimedoj, la reserĉadojn sub formo de artikoloj, notoj aŭ libroj.

Bonvolu skribi al Michel Clément, Ph.D., SAT kaj UEA membro.

Retadreso: clementm@altavista.net  
aŭ clement.michel@uqam.ca

Montrealo, Kebekio, la 4-an de majo 1999

Sekve de mia alvoko sendita antaŭ kelkaj monatoj, mi ricevis proksimume sesdek mesaĝojn apogantajn mian instigon pri la Internacia societo de historio.

daŭrigata ⇒

daŭras ⇒

Do, mi pripensis ĝin kaj mi proponas al vi simple organizi reton, al kiu mi donis la nomon Internacia Reto De Esperantistaj Historiistoj.

Tiu reto utilos al interŝanĝoj de informoj kaj dokumentoj, ĉefe pri la historio de nia movado (landa kaj internacia) kaj pri aliaj fakaj historioj.

Mi proponas :

UNUE: Laŭ mi, ni devos malfermi tiun reton al ĉiuj esperantistaj historiistoj (amatoraj kaj profesiaj).

DUE: Ni povus inter ni nomumi iun kiel Sekretarion aŭ per alia titolo por publikigi en sia TTT-paĝo la liston de ĉiuj retmembroj kaj kunligi ĉiujn membrojn al tiuj, kiuj ne havas komputilon.

TRIE: Bonvolu sendi al mi (clementm@altavista.net) viajn mesaĝojn pri tiu propono. Poste, mi komunikos al vi la respondojn kaj poste ni vidos laŭ viaj proponoj kaj sugestoj.

— Frate, Michel Clément, Ph.D.

TTT-paĝo pri historio: <http://www.er.uqam.ca/nobel/k33440/premier.html>

## **Ĉu La Pastro Solis (1832-1903) Estis La Unua Esperantisto En Nordameriko?**

Kelkaj faktoj:

François-Xavier-Isaie Soly/Solis naskiĝis en vilaĝo (Marieville, Kebekio - apud Montrealo) la 29-an de januaro 1832. Li estis la filo de Pierre Soly, fandisto, kaj de Théodiste Benjamin. Li lernis en la Pastrolernejo de Maskuto (50 km de Montrealo) inter 1844 kaj 1856 kaj pastrigis, la 17-an de majo 1856 fare de Lia Episkopa Moŝto Jean-Charles Prince. Li vikariis dum multaj jaroj tra la regiono kaj en Usono (Worcester kaj West-Gardner, Massachusetts inter 1883-1887). Li emeritiĝis en 1887 en maskuta pastrolernejo kaj poste li lernis, tradukis, korespondis kaj verkis Esperante. Li mortis en 1903 pro akcidento.

Laŭ dokumentoj (*Le Clergé Canadien-Français* kaj *Histoire du Séminaire de St-Hyacinthe*) el la privataj arkivoj de la Maskuta Pastrolernejo, li lernis Esperanton

daŭrigata ⇒

daŭras ⇒

kiam li emeritiĝis, eble je 1892, sed ni ne scias kiu enkondukis lin al la lingvo. Li fondis la revuon *L'Esperantiste Canadien* kaj tradukis kelkajn kebekiajn rakontojn kaj unu romanon de fama kebekia verkistino, Laure Conan (1845-1924), *L'oublié* (La Forgesitulo, 1900). Premiita de la Académie française (la Franca Akademio), la tradukaĵo ne eldoniĝis. Li korespondis kun multaj esperantistoj kiel René Lemaire, la pastro Grabowky, Louis de Beaufront sed, bedaŭrinde, ni havas nur kelkajn dekojn da leteroj de tiuj personoj. Strange, ni ne trovis korespondaĵojn kun L. Zamenhof. Fakte, pastro Solis klopodis por Esperanto dum 11 jaroj kaj li influis la movadon en Kebekio kaj eble en Norda-Ameriko. Krome, li batalis por la lingvo kiam la gazeto *La Presse* eldonis la 5-an de aprilo 1899 artikolon de André Theuriet (1833-1907) kontraŭ Esperanto (tiu-ĉi artikolo eldoniĝis pli frue en la franca gazeto *Le Journal* en 1899). Li vigle respondis en tiu ĵurnalo la 8-an de aprilo 1899, kio estis unu el la multaj agadoj de la pastro Solis por Esperanto.

— Michel Clément kaj Normand Fleury

## Stranga Parencaro

Mi edziniĝis al vidvino kiu havis plenkreskan filinon. Mia patro ofte vizitis nin, enamiĝis kun mia vicfilino and edzinigis ŝin al si. Tiel mia filino iĝis mia patrino.

Mia edzino naskis knabeton, kiu do estas mia onklo, ĉar li estas frato de mia patrino kaj bofrato de mia patro. Ankaŭ al mia filino naskiĝis knabeto, kiu estas mia frato kaj samtempe mia nepo.

Mia edzino estas samtempe ankaŭ mia avino, ĉar ŝi estas la patrino de mia patrino. Do, mi estas la edzo de mia avino, kaj se mi estas la edzo de mia avino, pro tio mi estas la avo de mi mem. Kiel stranga parencaro!

— Bonkore kontribuis Jozefo Ladislao Viktoro LENKEI, Oradea, Rumanio

